Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 23an de oktobro 2008 per Skype.

(Aprobita la 13an de novembro 2008.)

Partoprenis:

Jardar E. Abrahamsen (JEA, en Trondheim),
Arne Olav Mjøen (AOM, en Trondheim),
Eli Fitjar (EF, en Bergen),
Ulf Lunde (UL, en Os),
Anne Karin Bondhus (AKB, en Stavanger),
Asbjørn Lindh (AL, en Oslo),
Ingebjørg Rambjør (IR, en Bergen).

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 25an de septembro

Aprobita.

2. Investoj

La tutmonda ekonomia krizo kaŭzis malkreskon en niaj akcifondusaj investoj. Ni finfine elprenis ĉiom de nia mono de tie, sed nun rekomencis aĉeti akcifondusojn.

La kasisto elpensos strategion por niaj investoj kaj prezentos ĝin al la estraro antaŭ la venonta interkonsiliĝo.

3. Informoj pri la valoroj kiujn ni transprenis de la Eldonejo

La kapitalo konsistas el du bankkontoj:
26 801 kr en unu
17 372 kr en la alia
Sume 44 173 kr.

500 eŭrojn el tio Harald Rygg sendos al UEA fine de 2008 por uzi por pagi kotizojn (kiujn norvegaj abonantoj pagis al li per norvega valuto).

4. Abonkotizo Norvega Esperantisto 2009

La kasisto kalkulis, ke la abonprezo restos 100 kr ankaŭ en 2009.

5. Telefono en Esperantonia

Fortel ĉesos oferti telefonabonon. Oni ofertis al ni transiri al Telio.
Decido: NEL akceptas tiun oferton.

6. La klubo de Oslo kaj ekonomiaj konsideroj

La nuna domluo de nia ejo en Oslo (Esperantonia) estas entute ĉ. 28 000 kronoj jare, plus kelkmil por ke la domkonto ne konstante deficitu. Antaŭe la klubo de Oslo, kiu posedas duonon de la ejo, akceptis pagi proksimume la duonon de la sumo. Nun la Oslo-klubo ŝanĝis sian opinion. Laŭ letero de la klubo, ĝiaj kotizaj enspezoj estas ĉ. 5 000 kronoj, dum tiuj de NEL estas ĉ. 17 000 kr post repago al kluboj kaj presado/dissendo de la membrogazeto. Aldone NEL transprenis la librojn kaj monon de la Eldonejo, kaj enspezas pro vendado de libroj.

Tial:
a) La klubo proponas ke NEL plialtigu la repagon al la kluboj.
b) La klubo proponas ke la venonta alvoko pri libervolaj donacoj estu por la Oslo-klubo.
c) La klubo proponas ke pro la malsimilaj enspezoj la klubo pagu kvaronon el la domluo kaj NEL tri kvaronojn.

Decidoj:

NEL havas multajn pliajn elspezojn ol tiuj, kiujn mencias la Oslo-klubo en sia letero. I.a. ni havas administrajn elspezojn, kotizelspezojn al UEA k.a. kaj la pagojn al NJE. En 2007 NEL fakte havis netan deficiton je 7 000 kr.

Ni tial respondas tiel al la proponoj:

a) Tia plialtigo okazas aŭtomate, ĉar la repago estas certa procento (proksimume 24%) de la klubkotiz-enspezoj. Nur la Landa Kunveno, ne la Estraro, rajtas ŝanĝi tiun procenton.

b) Se estos proponata konkreta projekto, ni povos fari tiel. Sed kolektadon de mondonacoj de la membroj por kovri ĝeneralajn, ĉiujarajn elspezojn de unu regiona klubo, NEL ne aranĝos.

c) La Oslo-klubo posedas 50% de Esperantonia, kaj la Ligo same posedas 50%. Kiel posedanto oni havas rajtojn kaj devojn. Laŭ la Liga Estraro, la Oslo-klubo respondecu pri 50% de la kostoj de la posedado.

Por tamen montri sian bonvolon al la Oslo-klubo, la Estraro de NEL decidas, ke ĉiom de la kapitalo, kiun NEL «heredis» de Eldonejo Esperanto je ties malfondiĝo, iru rekte al la komuna Domkonto, kaj ke parto de tiu sumo estu uzota por redukti la jaran lukoston (laŭ 50-50-divido inter la Oslo-klubo kaj la Ligo) per entute 6 000 kr dum du jaroj (2008 kaj 2009). Cetere, dum

tiu periodo NEL ofertas al la Oslo-klubo, ke tiu ricevu 60% de ĉiuj luig-enspezoj de Esperantonia (inkluzive la kunvenojn de Sameiet) dum la Ligo ricevu 40%, ĉar la Oslo-klubo faras la praktikajn aranĝojn pri luigado.

Post la fino de tiu periodo oni rekonsideru tiun ĉi aranĝon.

7. La klubo de Oslo kaj libroj

En la Oslo-kluba estraro leviĝis la ideo ke la klubo transprenu la vendadon de la libroj de la malfondita Eldonejo, ĉar oni vendas plejparte al osloanoj. Pri transpago aŭ enspezoj la klubo ne faris proponon, sed petas provizorajn komentojn de la NEL-estraro.

Decido:
Ĉar parto de la librostoko kiun NEL transprenis kiam la Eldonejo malfondiĝis, troviĝas en Oslo, kaj parto en Trondheim, NEL donacas al la Oslo-klubo la parton kiu troviĝas en Oslo, kaj al la Trondheim-klubo la parton kiu troviĝas en Trondheim.

8. Estrara kunvenplano por 2009

Decido: La estraro decidis la jenan kunvenplanon por 2009:
15an de januaro
19an de februaro
26an de marto
7an de majo
4an de junio
27an de aŭgusto
24an de septembro
5an de novembro
10an de decembro

9. Seminario en Trondheim en decembro: Raporto pri progreso de la preparoj.

Anne Karin prelegos pri plantoj.
Asbjørn prelegos pri plantoj kaj pri bildstrioj.
Judith diros ion pri la bildstrio Pondus.
Ulf prelegos pri aliaj E-bildstrioj kaj montros ekzemplojn.

Jam estas 6 eksterurbaj aliĝintoj al la seminario.

10. Estrarkunvenaj protokoloj de NEL

NEL kutimas dissendi siajn plenajn protokolojn. Montriĝas ke la finna asocio ne faras same; ili informas publike nur per resumoj. Leviĝis demando, ĉu ni faru laŭ la finna modelo.

Decido: Ni preferas dissendi la tutan protokolon, same kiel ĝis nun.

11. Peto pri kunlaboro

La dana asocio invitis la nordiajn E-asociojn kunlabori en NGO Forum, ombrela organizo por NGO-oj (Non-Governmental Organisations) ĉe la Balta Maro. NGO Forumo aranĝas sian propran kongreson unu fojon jare. La venonta okazos en Danio en 2009. Por partopreni necesas registriĝi kiel membro de NGO Forum.

Por pliaj informoj, vidu:
http://www.cbss.st/history/facts/
http://www.cbss.st/partners/ngoforum/
http://www.cbss-ngo.dk/?%D8STERS%D8ARBEJDET

Decido:
NEL suferas de manko de laborfortoj nuntempe, sed se ĝi estas senkosta kaj ne nepre postulas ĉeeston dum la kongresoj, membreco povos esti interesa por NEL. La estraro esprimas pozitivan sintenon al la propono.

12. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris de 1930h ĝis 2145h.
La venonta interkonsiliĝo okazos je la 13a de novembro.
Raportis Ulf Lunde, sekr.